



Eldonata de :

Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 LAROQUE TIMBAUT
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux

* Abono por unu jaro :

* 18FF (Francio : 15FF)
* - aŭ egalvaloro -
* al la ĉi-apuda pĉk.



BONVOLU KOREKTI en PIV kaj PAG

G. WARINGHIEN, demandite pri kelkaj esprimoj,
rigardas ilin eraraj.

1. En PLENA ANALIZA GRAMATIKO :

- p.100 linio -17 :
"ĵus antaŭ la poseda adjektivo" devas
esti : "TUJ antaŭ..."
(Pri tio, vidu PIV "TUJ : -2) loka...)
- p.114 linio -12 "duono da litro"
devas esti "de" (vidu PAG p.197 -14
kaj PIV, sub "DU : duono de...")

2. En PLENA ILUSTRITA VORTARO :

- Ankoraŭ : "Rim: oni vidas ke ankoraŭ
troviĝas ĵus apud..." devas esti :
"TUJ apud..."
- Atendi : "li estas atendata de ĉiuj liaj
admirantoj" devas esti : "de siaj"
(vidu Aktoj de Akademio II p.35 :
"ŝi estas amata de siaj instruistinoj")
- Ŝanĝi : "ŝanĝa : tia ke ĝi ŝanĝas"
devas esti : "ŝanĝiĝas"
- Atlantiko : "trans..." devas esti : "tra..."

LENTAIGNE

Jen la REABON - SEZONO !

... almenaŭ por la plimultaj el ni, kiuj reabonadas jarfine
al amasoj da gazetoj, ĉiuj nepre abonendaj.

- * Se vi opinias, ke "Laŭte!" estas tia, kaj ke la adres-
banderolon de tiu ĉi via numero ornamas la mencio :
FINO DE VIA ABONO... vi plenumu la sanktan devon !
- * Se krome vi deziras ricevi la broŝurkolekton "1982" (*)
profitu la specialan ofertan : Laŭte + broŝ.82 : 60 FF
- * Al ĉiuj - eĉ al nereabonantoj - ĝojajn jarfinajn festojn!
Al la pluabonantoj, rendevuon fine de januaro por la 40a
numero !

"Laŭte!"

(*) vd. la rubrikon : "SAT-Broŝurservo".

Nia debato :

Ĉu ni estas pretaj ?

Se leĝpropono pri lernado de esperanto en la duagrada
lernejoj estus akceptita fare de la franca registaro, ĉu
la E-movado kapabla kontentigi la peton per kapablaj kaj
rajtigitaj profesoroj ?

Eĉ en la nuna situacio (nur kursoj tie, kie ekzistas
personoj scipovantaj lernigi esperanton), oni devas konstati,
ke en multaj urboj, kie ekzistas duagrada lernejo, neniu
profesoro estas surloke aŭ proksime.

Oni povas supozi, ke la anonco de la leĝo pri ebleco
lerni esperanton kiel fakultativan lingvon en liceoj vekos
intereson pri tiu transnacia komunikilo.

Por ke tiu leĝpropono ne restu vana sukceso, sed fariĝu
realaĵo, estas du nepraj kondiĉoj :

- unue, varbi profesorojn. Jen la plej urĝa afero laŭ mia
vidpunkto. Tiu profesoroj laŭleĝe devas esti liceaj
profesoroj, sed ne devige pri lingvoj, ekzemple pri
geografio, ktp. Sed ili estu kapablaj instrui esperanton
laŭ la oficialaj normoj. Kompreneble, alia persono sci-
povanta esperanton el iu ajn profesio povas helpi la
bonvolan profesoron lerni kaj perfektigi sian kapablecon
en la esperanta lingvo.
- due, varbi lernantojn. Por tio necesas vekti la intereson
de la lernantoj al esperanto, montrante la praktikan
uzadon de tiu lingvo, ekzemple por interlicea korespondado,
persona korespondado, intersanĝoj de lernantoj kun ekster-
landanoj, ktp.
Gravas ĉefe la persona konvinkigo de la profesoro.

Speciala alvoko devas celi la profesorojn aktivulojn en
la socialista partio (iniciatinto de la leĝpropono), por ke
ili transformu tian laŭdindan proponon en realaĵon, sed

ankaŭ la profesoroj de aliaj politikaj tendencoj, kompreneble, devas agi. Ni ne timu la tro-plenon !

J.G.

* * *

Ĉ U N I E S T A S P R E T A J ?

Ne !

Kaj tio tre gravas : la leĝpropono povus tial fariĝi venena donaco !

Unue, ĉi tiu leĝpropono valoros nenion, se ne akompanos ĝin propagandrimedoj. Ni ne posedas ilin : la registaro devos doni ilin al ni. Sed por kion fari ?

- Miaopinie, antaŭ ol varbi profesorojn, ni devas vekti intereson pri E en la publiko. Fakte, al kio utilis varbi profesorojn, se neniuj lernanto postulus lerni Esp-on ? Ekzistas ilo por taŭge kaj efike propagandi, tio estas radio kaj televido. Kial ne organizi elsendon "Dossier de l'écran", ekzemple, pri Esperanto ? Kial ne uzi, dum kelkaj monatoj, esperantistajn tradukistojn, dum internaciaj debatoj ĉe televido ? Certe ekzistas videaj bendoj pri esperantaj kongresoj aŭ aranĝoj : kial ne projekcii ilin ĉe televido ? Sed, kompreneble, por tion fari, necesas kunlaboro de la oficialaj instancoj !

- Samtempe, propagando devas esti organizita en instruistaj medioj, kaj precipe en seminarioj. Ni mem povas organizi prelegojn en seminarioj ; sed bedaŭrinde, nur malmulte da seminarianoj instruos en kolegioj, kaj tio do ne sufiĉos. Kaj jen la plej granda malfacilaĵo : sukcesi eniri lernejojn !

La klubo de Saint-Brieux sendis, pasintan jaron, leteron al ĉiuj duagrada lernejoj (kolegioj, liceoj, ktp), proponante prelegojn, rektajn kursojn, perkorespondajn kursojn ; entute, ni sendis ĉ. 200 leterojn : ni ricevis eĉ ne unu respondon !

Nur personaj kontaktoj ebligas malfermi la pordojn. Sed restos alia malfacilaĵo : kiam organizi prelegon por la

lernantoj ? Ili jam estas superŝutitaj de laboro ; nur en lernejoj, kie ekzistas internulejo, tio eblos ; kaj tiaj lernejoj fariĝas pli kaj pli malmultaj.

Due : la leĝpropono proponas enkondukon de E nur ekde la 4a klaso, kiel elektebla lingvo : lernantoj elektos ĝin nur kondiĉe ke ĝi ebligu al ili ricevi kelkajn kromajn poentojn dum ekzameno, aŭ utili al ili por trovi laboron...La gepatroj ludos gravan rolon ĉi-flanke, kaj ni ne forgesu ilin dum niaj propagandagadoj. Aliflanke, miaopinie, Esperanton oni enkonduku ne tiel malfrue, sed ekde la "meza kurso" (2a jaro) : ĝi estas la plej taŭga kaj efika momento, pro diversaj kialoj, kaj inter ili, pro du : unue, en tiu klaso la gramatika programo multe gravas, kaj Esperanto estus mirinda helpilo por studo de la franca lingvo (po du horoj semajne, ekzemple). Due, la sekvontan jaron la infano komencos lerni la unuan eksterlandan lingvon : Esperanto ankaŭ por tio multe helpus. Tria kialo : la instruistaron ni eble pli facile konvinkos, ol la profesoraron !

Fine, kio necesas, tio estas, ke ni tuj organizu studkunvenojn por pristudi la problemon. La estraro de UFE ne havas la solvon en siaj manoj ; tio estas la afero de la tuta esperantistaro.

J. Paul

* * *

K I A L M A L T R A N K V I L I Ĝ I, se tiu leĝpropono estos akceptita ?

Ĉu proponante ĝin, ni ne esperis sukceson ? Certe ja ni devas respondi pri la sukceso de esperanto-kurso en la lernejoj, sed jam de longe disvastigado de la internacia lingvo estas unu el la ĉefaj zorgoj, agadoj de la Esperantistoj.

Se la leĝpropono estos akceptita, estos nova pordo malfermita al Esperanto, estos pli facile eniri la lernejojn por starigi kursojn. Praktike, ekde nun ne estas sufiĉe da "profesoroj" pretaj starigi, respondi pri esperanta kurso en lernejo.

Necesos fari ĝeneralan statuton por apliki la leĝon, kiu antaŭvidos plurajn ŝtupojn :

Sesdek esperantistoj de ICEM-ESPERANTO (FREINET-Pedagogio) kunvenintaj en VAISON-la-ROMAINE (Francio) de la 16a ĝis la 26a de Julio 1981 :

- * ĝojas pri la probabla enkonduko de Esperanto kiel fakultativa fako en la francajn lernejojn ;
- * insistas, por ke ĉiu klopodu perfektigi en la kono de la lingvo kaj kapablu trapasi la ekzamenon, kiu rajtigos lin instrui ;
- * substrekas, ke la afero pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn koncernas ĉiun ajn, sendepende ĉu li apartenas aŭ ne al asocio, kaj sendepende de la asocio, al kiu li eventuale apartenas ;
- * sugestas, ke oni kreu sendependan organizon, similan al FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO, kies nura celo estus okupiĝi pri tiu problemo, kaj kiu konsistus el reprezentantoj de la diversaj asocioj, sed ankaŭ el universitatoj, kies kompetenteco estas agnoskata de ĉiuj ;
- * opinias, ke ICEM-Esperanto, pro sia 50-jara sperto, ankaŭ devus esti reprezentita en tiu organizo.

(Teksto de la dua rezolucio de ICEM-Esperanto, julio '81. La unua rezolucio celas la franclingvan publikon kaj tial enhavas jenajn apartajn punktojn : - red)

- * konstatas, laŭ sia 50-jara sperto, ke la interlernejaj internaciaj rilatoj (speciale de klaso al klaso) estas tre efikaj por enradikigi Esperanton ne nur en la lernejo, sed ankaŭ en la vilaĝo, en la kvartalo, ktp ;
- * pro tio estas favoraj al enkonduko de Esperanto jam ekde la du lastaj jaroj de la elementa lernejo (9-11jaraj lernantoj) ;
- * altiras la atenton de la gepatroj kaj de la diversaj instancoj pri la aparte granda avantaĝo, kiu rezultas el tiu instruado por pli posta studo de la naciaj lingvoj, kiel atestas pluraj oficialaj eksperimentoj.

Aldone...

- * opinias, ke kiu estos konatiĝinta kun Esperanto estante 10-11jara, tre certe estos allogita de la perspektivo elekti la lingvon kiel fakultativan fakon, kiam pli poste prezentiĝos la okazo en duagrada lernejo, ĉar la studado estos tiam plene motivita.

NE REVI ...

Unue ne estas certe, ke la leĝpropono fariĝos realaĵo, precipe, kiam oni ne plu bezonas la voĉdonilojn de la esperantistoj.

Mi mem trapasis la ateston pri kapableco tiucele. Ĉar mi laboras en liceo, mi facile povus instrui E-on kaj tiel min vivteni, sed mi iom dubas, ĉu tio efektiviĝos. Mi apartenas al la kategorio de "helpaj" instruistoj, tio estas maldungeblaj. Ĝis nun niaj laborkondiĉoj estis tre malbonaj kaj niaj salajroj ofte ege malgrandigataj per veturadkostoj. Oni promesis al ni ĉiuj antaŭ la balotoj redungadon kaj... kio okazis ? Multaj estas nun senlaboraj kaj la aliaj, kiuj ĝis tiam instruis, inter kiuj mi, faras nun administracian laboron (kaj ofte simbole).

Bone povas okazi, ke la leĝpropono estos tute forgesita, tamen eble ĝi realiĝos, se ĝi ne kostos tro kaj se esperantistoj insiste petas, precipe se pro manko de diplomitaj instruistoj la kvanto de lernemuloj ne estos tro granda.

Estus ege bone, se multaj el ni, precipe instruistoj, trapasus la ateston pri kapableco, kiu ebligas al ili estonte instrui nian lingvon.

Sed revu pri faritaj promesoj mi lasas al aliaj.

Robert.

ĈU NI ESTAS PRETAJ ?

- Verŝajne ne.

Necesas multe da laboro, por ke ni estu pretaj. Ankaŭ verŝajne multe da E-istoj estas pretaj por kunlabori, sed ili ne scias, kion ili precize devas fari aŭ - kiam ili scias - ne sentas sin kapablaj.

Kio mankas ? Organizo kaj informcirkulado. Ĉiu E-isto devas disponi, senpage kaj senkondiĉe, pri la informoj pri la nuna situacio :

- listo de la francaj regionoj kun la proksimuma nombro da E-istoj kaj kapablaj profesoroj ;
- listo de bezonataj laboroj, elekteleblaj laŭ la kapablecoj: sekretariado, tajpado, desegnado, afiŝoj, kontaktoj, publikrilatoj...ktp.

Ti maniere ĉiu scios, kion li povas kaj devas fari.

Por pluvivi kaj disvolviĝi Esperanto bezonas pli da informcirkulado kaj da malfermo al ekstera mondo.

Ĵanseb.

ĈU NI ESTAS PRETAJ ?

JES! SED
RAPIDU!!

SLURP!

KRUNC!
ĈOMP!

ESPERANTO en la LERNEJOJN ?

Ĉu finfine Esperanto trovos lokon en la franca instrua sistemo ? Povas esti. Tamen verŝajne neniu havas iluzion kaj konscias, ke kio estos farita konsistos el nur ET-ETA paŝo.

Senkaŝe, mi diru : des pli bone !

Ĉu paradokse ? Ne !

o,
toj

gio?
esiaj
rajt-

eranto
kon-

tajn

en duagrada lernejoj kaj lernejoj.

Sed ne nur ilin, ankaŭ la instruistojn de la unuagrada lernejoj. Tiuj ĉi, enkondukante en sian lernejon la internacian kolektivitan korespondadon (de sia klaso kun alilandaj klasoj), preparos la terenon por pli posta (post 5, 6..jaroj) sistema lernado de Esperanto.

Ek al la laboro !

Lentaigne.

Red. : Ni lasu provizore al kdo Lentaigne la finan vorton.

Sed ne ĉio estas dirita. Pliaj kontribuoj estas bonvenaj !

Ĉe la franclingvaj anarkistoj : La "Kajeroj Max NETTLAU" ĵus publikigis la katalogon de la libroj pri anarkismo disponeblaj ĉe la eldonistoj kun la adresoj de la eldonejoj, kaj alfabeto listo de la aŭtoroj.

Adreso : Cahiers Max NETTLAU n°2, C.P.C.A, BP. 21

F 94190 VILLENEUVE ST GEORGES

Prezo : 10 FF.

Komunikis J.G.

Tium
Por
informe

Okt
81.


LIBRO-SERVO DE AMIKA E-RONDO AĜENIA

Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux

La prezoj, en francaj frankoj, ne entenas
la afrankon. Pagi post ricevo de fakturo.

Absolutismo (Lanti) presita broŝo.	3
Nouveau Cours rationnel et complet d'espéranto. Bindita : 40. Broŝo. :	35
Kasedo por "Cours Rationnel"	30
Dictionnaire pratique	50
Dictionnaire de poche	12
Doktoro Rosales (G. Silber)	5
Esperanta Mozaiko (Faulhaber)	12
Fabelo pri bona suneto (por infanoj)	7
Forto de l'Vero (Adi)	10
Freŝa mateno (Reuven Kritz)	25
Grand Dictionnaire E/F (Waringhien)	60
Hamburgo en retrospektivo (Lapenna)	40
Junulejo (Cané) + La buĉejo (Echeverria)	10
Junulkurso (komentoj franclingvaj)	20
Suplemento al Junulkurso (franc.)	4

30



ESPERANTO en la LERNEJOJN ?

Ĉu finfine Esperanto trovos lokon en la franca instrua sistemo ? Povas esti. Tamen verŝajne neniu havas iluzion kaj konscias, ke kio estos farita konsistos el nur ET-ETA paŝo.

Senkaŝe, mi diru : des pli bone !

Ĉu paradokse ? Ne !

Des pli bone, ĉar neniu estas preta, nek la publiko, nek ni.

- 1) Pri la publiko : se ne ekzistas kvazaŭ ĝenerala konsento (almenaŭ : vasta), okazos same kiel okazis en 1950 koncerne la reformon de la franca ortografio. Memoru. BESLAIS, Direktoro de la Unuagrada Instruado, planis tre moderan reformon. Sed la amaso da protestoj (aperintaj en "Le Figaro Littéraire") devigis lin rezigni pri la afero. Ni memoru same, ke la atingita sukceso en Hungario estis ebla nur post longa preparado.
- 2) Pri NI : Kiom da posedantoj de la Atesto pri Pedagogio? Mizera nombro. Oni povus eble allasi, ke ankaŭ profesiaj pedagogoj, poscdantaj Ateston pri Kapableco, estu rajtigataj instrui. Tamen... Resume : mankas kadroj.

El tio, konsekvenca, ke ne sufiĉas deziri, ke Esperanto estu instruata en la lernejoj. Al la sukceso ni devas kontribui perfektigante en la kono de la lingvo.

La afero koncernas esence la instruistojn instruantajn en duagradaj lernejoj kaj liceoj.

Sed ne nur ilin, ankaŭ la instruistojn de la unuagradaj lernejoj. Tiuj ĉi, enkondukante en sian lernejon la internacian kolektivitan korespondadon (de sia klaso kun alilandaj klasoj), preparos la terenon por pli posta (post 5, 6. jaroj) sistema lernado de Esperanto.

Ek al la laboro !

Lentaigne.

Red. : Ni lasu provizore al kdo Lentaigne la finan vorton.
Sed ne ĉio estas dirita. Pliaj kontribuoj estas bonvenaj !

Ĉe la franclingvaj anarkistoj : La "Kajeroj Max NETTLAU" ĵus publikigis la katalogon de la libroj pri anarkismo disponeblaj ĉe la eldonistoj kun la adresoj de la eldonejoj, kaj alfabeto listo de la aŭtoroj.

Adreso : Cahiers Max NETTLAU n°2, C.P.C.A., BP. 21

F 94190 VILLENEUVE ST GEORGES

Prezo : 10 FF.

Komunikis J.G.

 * LA BAHAA RELIGIO *

La religio fondita de Baha u llah (arabe : la majesteco de Dio) kreigis en Persio meze de la 19a jarcento. Ĝi signifas ne nur renovigon de la eternaj veroj, sur kiuj baziĝas ĉiuj manifestitaj religioj de la pasinteco, ĝi liveras ankaŭ la dian planon de savado por solvi la nuntempajn bezonojn de la homaro. Esencaj principoj de tiu kredo, de tiu vera mondreligio, kiujn Baha u llah skribis inter 1853 kaj 1892, estas :

- la sendependa serĉado de vero, libere de antaŭjuĝoj kaj tradicio
- la unueco de ĉiuj religioj en ties spiritaj bazoj
- la rezigno de ĉiuj antaŭjuĝoj, ĉu religiaj, ĉu rasaj, ĉu sociaj, ĉu naciaj
- la akordo, kiu devas ekzisti inter religio kaj scienco
- la egalrajteco de viro kaj virino
- la leĝa devo de plej bona eduko de ĉiuj infanoj
- la ĝenerala enkonduko de monda helplingvo apud la gepatran lingvon
- la limigo de riĉeco kaj la solvado de sociaj bezonoj
- la starigo de monda tribunalo por repacigi kverelantajn popolojn
- la justeco difinita de Dio kiel baza piliero de homa socio
- la estimo al ĉiu laboro farata kun servema spirito kiel al diservo
- religio kiel fortikaĵo de amo kaj komprenemo por la protektado de ĉiuj popoloj kaj rasoj
- agado por daŭra, universala paco kiel plej supera celo por la homaro.

Inspirataj de tiu vido pri unuigita kaj pacigita mondo, la bahaanoj de la lastaj generacioj, kiuj kredas al Baha u llah kiel al tiu, kiun promesis ĉiuj manifestadoj en la pasinteco, portis tiun mesaĝon al la tuta mondo. Homoj de ĉiuj rasoj, ĉiuj religioj, ĉiuj kulturoj, ĉiuj klasoj, kuniĝis en la bahaan religion. La bahaanoj en la tuta mondo kredas tiujn parolojn de Baha u llah :

"Ho vi infanoj de homoj !

La baza intenco, kiu animas la fidon al Dio kaj al Lia Religio, estas la postulo protekti la homan rason, favori al ĝia unueco kaj promocii la spiriton de amo kaj amikeco. Jen la ĝusta vojo, la firma kaj neŝanĝebla bazo. Kio levigis sur tiu bazo neniam povos esti malfortigata de la ŝanĝoj de la mondo, ankaŭ ne la renversoj de sennombraj jarcentoj povos subfosi ĝian konstruon. Nia espero estas, ke la religiaj gvidistoj de la mondo kaj ĝiaj regantoj volos unuece leviĝi por la reformado de tiu ĉi epoko kaj por la restarigo de paco."

La bahaan religio disvolviĝas ĉirkaŭ tri ĉefpersonoj : la Bab (Bab estas pordo en la araba lingvo), Baha u llah kaj Abdu 'l Baha. La Bab (1819-1850) anoncis en majo 1844 en Ŝiraz (Persio), aĝante 25 jarojn, ke li estas la heroldo de Tiu, kiu laŭ la sanktaj skriboj de la antaŭaj manifestadoj, devos unuigi la homojn kaj gvidi ilin al epoko de mondpaco. La Bab gajnis tiom da aliĝintoj, ke la persa registaro kaj la islama klerikaro kuniĝis kontraŭ lin, lin ekzilis kaj, en 1850, lin mortpafigis. 20 000 fideluloj liaj estis same kruele murditaj.

En 1863 manifestis Baha u llah, ke li estas tiu, kiun la Bab estis anoncinta - la de Dio elektita manifesto por tiu ĉi epoko. Dum preskaŭ 40 jaroj li estis ekzilita kaj mallibera. Dum tiu tempo li klarigis en multaj libroj kaj korespondadoj la verojn de sia manifestado kaj anoncis sian mesaĝon al la reĝoj kaj regantoj en oriento kaj okcidento.

Baha u llah nomumis sian plej aĝan filon Abdu'l Baha (1844-1921) interpretisto de sia instruo. Sub lia gvidado la bahaan religio estis enkondukata en Eŭropon kaj Amerikon. En 1921 Abdu 'l Baha mortis kaj estis entombigita sur monto Karmelo apud Haifa. Ŝoghi Effendi (1897-1957), la plej aĝa nepo de Abdu 'l Baha, kiun tiu nomumis per testamento interpretisto de sia instruo kaj gvidisto de la bahaan fido, gvidis la bahaan mondan komunumon, kies regularo pri administrado, prezentita en la skriboj de Baha u llah, povis sin apogi sur kreskanta nombro da naciaj kaj lokaj assembleoj. En 1963 estis elektata la Universala Ĉambro de Justeco, plej alta administracia institucio de la bahaan monda komunumo.

Per kreskanta spertado la hodiaŭaj bahaanoj scias, ke la diferencoj de la nacio, de la klaso kaj de la religio povas esti supervenkitaj per la unuiga potenco de Baha u llah.

La bahaa adordomo deziras kunigi en siaj sanktigitaj muroj, en spirite purigita etoso, nur homojn, kiuj "por ĉiam rezignis la vualojn de tro subtilaj tendencaj ceremonioj kaj estas volantaj adorantoj de la unu vera Dio, kiu en tiu ĉi epoko manifestis sin per Baha u llah". Neniu estas ekskludita, kiu deziras restadi. La bahaa religio havas neniun riton kaj neniun rigidan formon de diservo; ne estas profesiaj pastroj. En la adorsalono estas farata neniun prediko, neniun prelego. Sen interpreto estas legata la parolo de Dio laŭ sanktaj tekstoj de ĉiuj manifestitaj religioj. La homa voĉo sonoras ankaŭ en ĥorkantado - sen akompano de instrumentoj - por laŭdi Dion.

* * *

Tio estas parta traduko de informilo en germana kaj angla lingvoj eldonita de la Nacia Spirita Konsilantaro de la Bahaanoj en Germanio, D 6238 HOFHEIM-LANGENHAIN, Eppsteiner str. 89, Federacia Germanio. Post la tradukado mi skribis en Esperanto al la ĉi-supra adreso. Mi ricevis afablan respondon en angla lingvo de iu, kiu, (prave) supozante, ke mi deziras pluan informon, sendas al mi (senpage) informilojn en pluraj lingvoj, kaj 60-paĝan broŝuron en Esperanto titolitan "Kio estas la bahaa religio..."

Noto de Jakelino

.....
Noto de la red. de "Laŭte!" : Pri bahaismo pluraj libroj estas disponeblaj en esperanto :

- Kio estas la bahaa religio (menciita de Jakelino)
- Baha'i : la mondkredo por la nuntempa homaro (A.L.Dahl)
- Baha u llah kaj la nova epoko (J.E.Esslemont, el la angla tradukita de Lidia Zamenhof, kun lingva revizio kaj ĝisdatigo de R.Orloff Stone.)

Tiuj libroj troviĝas ĉe la Libroservo de UEA.

Ĉar la teksto sendita de Jakelino estas traduko, ĝi longe atendis liberan lokon en nia ĉiam plenplena bulteno, kiu ja celas ĉefe, ke rekte esprimu sin la abonantoj mem per eble ne geniaj nek de dio diktitaj (fakte, kial ne?...) sed propraj ideoj.

EKVIVAS
LA MIGRADSISTEMO !

Estas nun evidente, ke la migradsistemo ekvivas. Lastsomere vizitis nin esperantistojn en la ĉirkaŭaĵo de Stavangro en Norvegujo pluraj eksterlandanoj. Estis ĉio pli-malpli rektaj efikoj de tiu sistemo. Ne ĉiuj estis esperanto-parolantoj kaj antaŭ ĉio tute ne ĉio okazis laŭ originaj planoj. Sed certe la somero donis bonajn perspektivojn. Jen iomete pli detale.

Venis familioj al ni el Svislando, Aix-en-Provence, Ostendo en Belgujo, patro kaj filino el Parizo, tri personoj el Stokholmo. Dum periodo komence de aŭgusto ni havis entute naŭ gastojn. Iun sunbrilan tagon ni faris iomete specialan ekskurson. Ni elektis precipe belan lokon por tie renkontiĝi por trinki kafon. Kiel iri tien oni povis mem elekti, ĉu per piede, kanote, bicikle. Jes, estas vero. En la varia naturo de Rogalando preskaŭ ĉiuj liberaeraj aktivadoj estas eblaj. La parizanoj migris dum tuta semajno sur nia fama Hardangra Altebenaĵo. Iris kun ili esperantisto el la regiono. Ĉion ili portis sur la dorso, ankaŭ la tendojn.

Interesa parto de la ferio en Norvegujo de la diverslandanoj estis restado en montara domo nordoriente de Stavangro. Ili estis invitatitaj tien de la regiona naturprotektado, kiel partoprenantoj en la ekstera kadro de seminario, kio donis al ili multajn belajn eblecojn. Samtempe partoprenis tie ni tri esperantistoj de la regiono. Ankaŭ kun ceteraj partoprenantoj la gastoj interkonatiĝis, eĉ ekhavis inviton poste viziti ilin en Stavangro, interalie la novelektitan prezidanton de la tutlanda naturprotektado, stavangrano. Ĉe li tiutempe loĝis raportisto de la belga televido. Kun tiu ĉi niaj ostendanoj povis paroli per sia gepatra lingvo, la flandra.

La migradsistemo nun havas entute 51 reprezentantojn, inter Barcelono kaj Ĝenovo sude kaj Glasgovo kaj Bergen norde. Jen la tri kondiĉoj, se iuj deziras aliĝi :

- 1) Oni bone parolas esperanton. Leterskribado ekz. ne kreas problemojn.
- 2) Oni donas efikan informadon pri la eblecoj por piedmigrado en propra regiono. Ordinare la konsultanto rajtas renkonti persone la konsilanton.
- 3) Oni konas favor-

ajn eblecojn por tranoktado ne tro malproksimajn.

Volontuloj povas turniĝi al Laŭte: Migremulo.

* *

PERPIGNAN : Malfermo de kurso en interesa medio.

Alvokita de la Prezidanto de la geinstruistaj emeritoj, S-ro René Llech-Walter malfermis kurson la 15an de oktobro por la membroj. La kurso okazas ĉiun ĵaŭdon posttagmeze ĉe la sidejo de la Klubo, 21 Boulevard Clémenceau, 66000 Perpignan (Francujo)

* *

GIRONDIA VIVO

* En EYSINES, la 26an de septembro posttagmeze, okazis nia unua aŭtuna kunveno, 19 ĉeestantoj prezentis sin kaj, pli-malpli, ĉiuj parolis. Tio estis internacia kunveno, ĉar, inter la ĉeestantaro, sidis bulgara kamarado, esperantisto, kiu vivas en Bordojo nuntempe. Li afable paroladis pri la E-vivo en Bulgario kaj respondis plurajn demandojn.

* Nia grupo havis budon en la Socialista festo en CENON. Leo kaj Gaita deĵoris kaj raportis. Ili estas kontentaj ĉar multaj interesatoj petis informojn kaj kelkaj enskribiĝis por la kurso.

* Gilles kaj mi parolis pri la Renkontiĝo ICEM-Esperanto kiu okazis en Vaison-la-Romaine en julio. En internacia medio - 13 eksterlandanoj - ni laboris kaj ekskursis tra la belega Provenca regiono.

* Ginette prezentis la Internacian Larzakan kunvenon. Deko da geesperantistoj ĉeestis.

* Marcelo, kiu partoprenis la SAT-Kongreson en Bazelo, diris al ni, ke 19 landoj estis reprezentitaj, sed tamen la ĉeestantaro estis ĉefe franca. Li plezure kunvenis kun dudeko da gejunuloj.

* Micheline, Rose kaj Simone partoprenis E-semajnon en Sète. 3 eksterlandanoj ĉeestis. La programo konsistis el kursoj, ekskursoj kaj banoj.

* Petro deĵoris ĉe budo dum 3 tagoj en la ostrofoiro de GUJAN-MESTRAS. Vizitis lin Ministrino C. Lalumière.

* Micheline, nia grupkasistino, prezentis finanĉan bilancon ; enspezoj : 5 337 ; elspezoj : 5 030 ; saldo : 2 046 FF + la stoko de la libro-servo.

Ĉi-jare nia kotizo kostos : 35 FF minimume.

En CENON, dum nia oktobra grupkunveno ni parolis pri :

* Propagando : Michel deĵoris ĉe budo en la festo de "Lutte Ouvrière" (Laborista Lukto ; maldekstra partio), kiu okazis en Bègles. Li renkontis multajn interesatajn gejunulojn. La 27an de oktobro, en kadro de Bordoza Universitato, li intencas organizi informkunvenon. Gisèle disdonis flugfoliojn ĉe Dassault. Eble Marcel eklernos la lingvon !!! Ĉar por li Esperanto povas esti "Miraĝo" (*). Mi prezentis E-on en kadro de Ekologia Akvitania kunveno, fine de septembro, en Marcenais. Taŭga momento : mi parolis tuj post la sekretario de ECOROPA (Ekologia Eŭropa Asocio), kiu spertas la lingvajn malfacilaĵojn. Michel kaj Gilles havas kontaktojn kun liberaj radioj en Bordeaux. Dum nia venonta grupkunveno en Marcenais, la 21an de novembro, la enhavon kaj la formon de la dissendo ni preparos.

* Semajnfinaĵaj staĝoj : por tion organizi ni havas taŭgan lokon ĉe "Maison de la Promotion Sociale" (Sociprogresema domo) en Artigues-près-Bordeaux. Leo substrekis la duoblan celon : konigi Esperanton kaj perfektigi la geesperantistojn.

* Zamenhofa Tago : pluraj ĝirondiaj kamaradoj intencas ĉeesti en Montauban. Estos, samtempe, nia decembra kunveno. Joël.

* *

P A R I Z O : Nun vi sciu, ke oni povas akiri "Laŭte!" en librejo PUBLICO (145 rue Amelot, 75011 PARIS) kaj ke, ekde la 2a de oktobro, en la kadro de "Radio-Libertaire", okazas ĉiuvendrede de la 20a ĝis la 21a Esperanto-Rubriko, sub la respondeco de SAT - Liberecana Frakcio. Centoj certe, miloj sendube, sen troigo, aŭskultas ĝin. Oni telefonas al ni rekte dum la dissendado je la tel. numero : 262 90 51 (ANarkio 90 51 !) kaj oni skribas al PUBLICO...

Ivo.

(*) Nomo de militflugilo konstruita ĉe Dassault.

AMIKA RENKONTIĜO
en MONTAUBAN
la 13an de Decembro

la ĉi-jara
ZAMENHOF
TAGO

Lasta anonco :

Okaze de la Zamenhofa tago ni kunvenos en "le foyer de Villebourbon" (rue des Augustins en MONTAUBAN, quartier de la gare, près du pont vieux).

Programo : matene : akcepto, kunvenoj, eble vizito de la malnova kvartalo.
Je la 12a kaj duono : tagmanĝo (kooperative preparita de Montauban-anoj kaj geamikoj el aliaj lokoj) 35 F.

Posttagmeze : TEATRAĴO : "Ĉu Dio bojas?" de la Krizalido (20 F)

Eblos alveni je la sabato posttagmeze (trankvilito : 18 F).

Ne forgesu vin anonci antaŭ la 10a de decembro al : Nicole Déjean, 14 rue Anatole France 82000 MONTAUBAN.

BONE NOTU : Zamenhofa tago en O R G O N (F - 13) la 13an de decembro.

La E-Federacio de Vaukluzo aranĝas departementan perfektigan kurson en MJC Croix des Oiseaux en AVINJONO (unu fojon monate) kaj konversacian rondon samloke, ankaŭ unu fojon monate.

La "Deklaro pri la rajtoj de la handikapuloj" ekzistas ankaŭ en esperanto. Sekcio de la urbodomo de BARCELONO presis ĝin 3000-ekzemplere. Peti ĝin ĉe : IBERIA ESPERANTO-GRUPO, Apartado 27.066, BARCELONA.

Ĉiuj ekologiistoj, pacistoj, kontraŭatomcentralaj esperantistoj kaj aliaj "marginuloj" longharaj kaj "paraleluloj" kontestemaj... retroviĝos en GOLFECH (Tarngaronio) la 29an de novembro. Ĉiuflankaj posedantoj de atombomboj restu hejme : la tria mondmilito ne tiun tagon eksplodos.

Kvankam prokraste, pro lokmanko, "Laŭte!" informas pri :

M.S.K.

M O N D A S O C I A L - H U M A N I S T A
K U N V I V A D O

* RESUMO DE LA PROGRAMO DE M.S.K. :

Konstatante : ke la alfrontiĝo de la komunista kaj kapitalista blokoj estas imperialisma disputo alkondukanta pereigan militon ; ke la kreskanta skalado de la perforto kaj la terorismo minacas alporti haoson ; kaj ke la akumulado de atomaj kaj nukleaj armiloj kaj la imponaj militaj elspezoj baras la progreson kaj prosperon de la socio,

"MSK" CELAS :

1. - novan modelon de socio diferenca kaj de la kapitalista kaj de la komunista.
2. - strukturan kaj socian trian vojon, kiu ebligu estontan kunfluron de la du socioj, kaj klopodu la malstreĉigon inter la du kontraŭstarantaj mondpotencoj.
3. - respekton al la homa digno, kiu favoru la personecon kaj ŝirmu la homon de la mizero.

Pro tio, "MSK" klopodos kunigi, en novan organizaĵon, ĉiun personon, kiu aspiras :

1. - savi la pacon per ĉia ebla rimedo.
2. - enkonduki per evoluado novan socian strukturon en kiu la salajruloj kaj la entreprenistoj partoprenu en la rentumo de la entreprenoj proporcie al sia laboro kaj respondeco ĝis la plenumo de ekonomika demokratio pere de kooperativoj, kundirektado kaj aŭtodirektado de la entreprenoj.
3. - starigi Mondan Federacion de Popoloj, kiu planu la mondekonomikon kaj garantiu la stabilecon de la paco. Ni konsideras nacio aŭ popolo ĉiun kolektivon da homoj, kiu, posedanta ŝtaton aŭ ne posedanta ĝin, havas komunan lingvon, senton de socia homogeneco kaj reciprokajn interesojn.

Por atingi tiujn celojn estas necese :

1. - klopodi ĉe la intelektulaj kaj ĵurnalaj medioj, por ke ili kunlaboru kun tiu celado kaj apogu ĝin.
2. - starigi vastan opinion, kiu apogu tiun socian ŝanĝiĝon.
3. - forigi la abulion kaj la mankon de civitaneco de granda parto de la homamasoj, kaj
4. - potencigi social-humanistan movadon je monda skalo per nova organizaĵo "MSK", laŭ ties strukturaj Bazoj. (teksto de majo, 1980)

* *

* En aprilo 1981 aperis la unua numero de "Social-Humanista Gazeto". Ĝi estas dulingva (esperanta kaj kataluna), sed estonte aperos en aliaj lingvoj, ofsetita, 36-paĝa, kun jam tre riĉa enhavo :

- resumo de la celaro de social-humanismo kaj de ties gazeto ;
- opinioj de iuj intelektuloj, intervjuo de J. Dalmau ;
- opinioj de legantoj kaj simpatiantoj ;
- Esperanto, homaranismo en rilato kun MSK (kvankam ne-esperantista, MSK apogas esperanton) ;
- la ekonomia problemo ;
- Mondcivitanoj kaj MSK ;
- diskutindaj difinoj, humuro, ktp.

Ĉu ĉi ne povas interesi legantojn de "Laŭte!" ? Kompreneble jes ! Nu, notu la adreson :
Social-Humanista Gazeto, Cervantes 29, Apartado 313, TERRASSA, Hispanio.

"Laŭte!" salutas kun simpatio ankaŭ la 7an numeron de originala bulteno jene titolita "Ankoraŭsennoma Gazeto" eldonata de rondo - ankoraŭ sennoma -, en kiu partoprenas nia abonantino HUKUNAGA Makiko. Tiu 7a numero utilas kiel korespondilo de japanaj kaj ĉinaj samideanoj, instigas al debatoj pri paco kaj sinteno de la muna junularo en Japanio. Aparte plezuriga estas la fakto, ke tiu bonega gazeto donas al virinoj la lokon, kiun ili rajtas. Resume tre leginda eldonaĵo, kies adreson certe notos ĉiuj "laŭtuloj" dezirantaj ekrilati kun niaj japanaj samcelanoj :

HUZIMAKI Ken'iti, Izumiso 11, Toyotama-kami 2-15, Nerima-ku, TOKIO, 176, Japanio.

M A L J U N U L O R A K O N T A S . . .

En mia estinteco, iun tagon mi instalis lastmodelan radioaparaton, ĉe tre riĉa homo, kiu aĉetis grandan loĝejon kun pluraj ĉambroj por diversaj servistoj.

Por la perfekta funkciado de tiu radioaparato mi devis instali - en hodiaŭaj teknikaj vortoj - "la ligadon al la tero".

Mi demandis al plumbisto, kie pasas la plej proksima tubo.

Li respondis, ke tio ne estas komplika... ĉar ĉi tie "estas nur kvin banejoj".

Sekve, mi demandis, ĉu ĉi tie estas minerala banloko, instituto de beleco aŭ por fizika kulturo... por necesigi kvin banejojn.

Li respondis al mi, ke ĉiu "BONA" loĝejo enhavas kvin banejojn. Mi mire skuis la kapon kaj li eksplikis al mi : "Matene, kiam ĉiu sin levas, la estro devas sin bani kiel ĉiuj kaj ne povas sin malfruigi por sia laboro, la infanoj ne povas malfruigi por iri al la lernejo, same lia edzino ne povas sin malfruigi por sia laboro... Nu, ĉiu bezonas sian banejon en sama tempo..."

- Jes, mi respondis, tio necesigas nur tri banejojn... kaj pri la aliaj du banejoj ?

- Ili estas por la servistoj, ĉar la servistoj ne povas sin bani en banejo de la estro, nek en tiu de la estrino, nek en tiu de la infanoj... kaj se ili ne sin banadas, ili malbonodoras...

Krome, ofte gastoj, kiuj ne povas reiri hejmen malfrunokte, kaj restas ĝis mateno, uzas la kvinan banejon...

Per tiu eksplikado mi komprenis, ke iun tagon mi bezonos kvin banejojn en mia venonta ekzistado.

-nn-

En la venonta numero de "Laŭte!" : "Eŭropo en danĝero" de VALO, speciala paĝo por infanoj kaj, kompreneble, la kutimaj rubrikoj... laŭ ĉies kontribuemo. Ĝis !

Pri : LA VOJO ANTAŬEN

Prave S-ro Vito atentigas nin pri la problemo de analfabetismo, sed tiu lia interveno en la debaton neniel tuŝas la temon. Aliflanke, lia tiel senutila interveno en seriozan temon ja estas reago, kaj pro ĉiu tia reago, utila aŭ ne, mi estas danka.

Estas interese noti, ke analizo de la cifero donita de la intervenanto, (intervenisto?), kondukas nin laŭ interesa vojo. El la 4 304 000 000 da loĝantoj de la tero, (fonto: "La Jaro 1981"; Eld. TK/Stafeto; 1981), 37 procentoj estas legnepovantoj, (fonto: S-ro Vito). Restas 63 procentoj, aŭ 2 711 500 000 legpovantoj.

Se, el ili, 85 procentoj ne havas ĉiutagan rilaton kun komerco, (mia takso; tio estas: geinfanoj, soldatoj, malliberuloj, la plimulto de pensiuloj kaj aliaj, kiuj havas nenian, aŭ ne-multan, aĉetdecidpovon), la signifo estas, ke restas 406 700 000 legpovantoj, kiuj ja havas intereson por ni laŭ la temo de la debato. Se, inter ili, 40 procentoj estas denaskaj angloparolantoj, (mia takso, plejeble tro alta), restas 244 000 000, kiuj komercas en aliaj lingvoj. Prenante el ili la dek milionojn, kiuj scipovas la internacian lingvon, (mia takso, plejeble sen reala bazo), restas du cent tridek kvar milionoj da personoj, kiuj bezonas nian helpon.

Restas grava tasko por ni!

Lorenzo.

POR INTERNACIA ALFABETO

Ni solvos la cirkumfleksan problemon, ne forigante la supersignojn, sed aldonante novajn !...

Pripensu...

Esperanta Alfabeto tute ne sufiĉas por skriba komunikado. Eĉ en la E-gazetaro la literoj QWXY estas uzataj,

DISKOSERIO DE VARIOZAJ	10
Kalejdoskopaj Varieteco (E. de Bonaero)	7
Kiel esti amata (Brandys)	25
Kredu min, Sinjorino! (C. Rossetti)	20
La Krimo de l' Milito (Alberdi)	20
Libero kaj Amo (Petöfi)	3
La librecana socio (Bastjan)	5
La varmega suno (albumo por infanoj)	12
Ne tiel, sed tiel-ĉi (Faulhaber)	40
Paŝoj al Plena posedo (W. Auld)	50
Plena vortaro de esperanto	240
Plena ilustrita vortaro	22
Por la praktikantoj (Babin)	10
Sennacieca Revuo, 1978	7
Skizo pri filozofio de homa digno	14
Sur insulo malproksima (Remmers)	8
Tio, kion mi kredas (Jean Rostand)	40
Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz)	52
Vivo de Lanti (Borsboom)	35
Vivo de Zamenhof (Privat)	15
Vocabulaire espéranto (Duc-Goninaz)	35
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)	8
Vers une communication transnationale	20 ekz. : 1
2 ekz. : 1	20 ekz. : 8
Une langue internationale pour	15
écologistes et non-violents	100 ekz.
L'Espéranto au service des jeunes	(100) 8

(mi aldonas, ke estus ankoraŭ permesata skribi la signojn supre, sed estus nur estetika afero).

Ekzemple : $c^u s^i$ ankoraŭ $s^ang^is s^ian$
korsaj[^]on ?

- ③ Oni povus konstrui fonetikan alfabeton kun $26 \times (n + 1)$ signoj por indiki la prononcon de la naciaj vortoj. (Esperanto jam uzas ŭ kaj ĵ por skribi iujn francajn fonemojn).
- ④ Eblus difini rigoran alfabetan ordon. Se la apudsignoj aperos post Z, en Esperanto la alfabeto ordo ne estus ŝanĝita : $cu, cv, cz...c^a, c^b,...$
- ⑤ Eblus trakti listojn de internaciaj nomoj sen kripligi ilin kaj sen eraro. (Usona eldonisto kutimas sendi al mi duoblan reklamon, ĉar mia nomo estas en lia sliparo kun du malsamaj ortografioj !...)

Pri tiu projekto mi ŝatus legi la opiniojn de la legantoj de "Laŭte!", favorajn aŭ ne. Mi dankas la skribontojn.

Janseb

Prav
analfab
neniel
interve
ĉiu tia

Este
de la i
interes
tero, (
37 proc
Restas

Se,
komerc
mallib
havas i

estas, ke restas 406 700 000 legpovantoj, kiuj ja havas intereson por ni laŭ la temo de la debato. Se, inter ili, 40 procentoj estas denaskaj angloparolantoj, (mia takso, plejeble tro alta), restas 244 000 000, kiuj komercas en aliaj lingvoj. Prenante el ili la dek milionojn, kiuj scipovas la internacian lingvon, (mia takso, plejeble sen reala bazo), restas du cent tridek kvar milionoj da personoj, kiuj bezonas nian helpon.

Restas grava tasko por ni !

Lorenzo.

POR INTERNACIA ALFABETO

Ni solvos la cirkumfleksan problemon, ne forigante la supersignojn, sed aldonante novajn !...

Pripensu...

Esperanta Alfabeto tute ne sufiĉas por skriba komunikado. Eĉ en la E-gazetaro la literoj QWXY estas uzataj,

almenaŭ por propraj nomoj.

Ĉar Esperanto estas nur helplingvo, estos ĉiam nomoj de personoj aŭ de lokoj, kiujn oni ne povos skribi tiel sen igi ilin nekompreneblaj. Do, neeblos skribi Esperanton sen disponi almenaŭ pri 32 literoj (28 + Q, W, X, Y).

Mi trovis 36 aliajn literojn en la jarlibro de UEA (vd* la bildon), nur por skribi la proprajn nomojn.

Tiu solvaĉo (28 oficialaj kaj pli ol 40 eblaj literoj) estas malŝpariga, ne racia kaj tute neesperanteca.

Mi proponas tion : anstataŭigi la supersignojn per apudaj signoj.

Tiumaniere kelkaj signoj sufiĉas por plurobligigi la nombron de literoj en la alfabeto.

Ekzemple : a' e' e' s^ u^ z^o

La avantaĝoj de tiu solvo estas pluraj :

- ① Eblus skribi la proprajn nomojn (ĉiu lando povas proponi sian propran skribadon).
- ② La problemo de la cirkumfleksaĵoj estus aŭtomate solvita. (Mi aldonas, ke estus ankoraŭ permesata skribi la signojn supre, sed estus nur estetika afero).

Ekzemple : c^u s^i ankoraŭ s^ang^is s^ian korsaĵ^on ?

- ③ Oni povus konstrui fonetikan alfabeton kun $26 \times (n + 1)$ signoj por indiki la prononcon de la naciaj vortoj. (Esperanto jam uzas ŭ kaj ĵ por skribi iujn francajn fonemojn).
- ④ Eblus difini rigoran alfabetan ordon. Se la apudsignoj aperos post Z, en Esperanto la alfabeto ordo ne estus ŝanĝita : cu, cv, cz...c^a, c^b,...

- ⑤ Eblus trakti listojn de internaciaj nomoj sen kripligi ilin kaj sen eraro. (Usona eldonisto kutimas sendi al mi duoblan reklamon, ĉar mia nomo estas en lia sliparo kun du malsamaj ortografioj !...)

Pri tiu projekto mi ŝatus legi la opiniojn de la legantoj de "Laŭte!", favorajn aŭ ne. Mi dankas la skribontojn.

Ĵanseb

Literoj uzataj en la Jarlibro de UEA

por transskribi proprajn nomojn (krom q,w,x,y)

ä á ã â æ a ç ĉ c ç é ē ě
 ê ħ í ĺ ŋ ñ ó ô ö ø ö ř
 š ś ŝ ü ú û ý ž ź ź

B I C I K L E T R A E Ŭ R A Z I O

Sub ĉi tiu titolo aperos ekde januaro 1982 artikol-serie la plej granda parto de la raporto de Lucien A. Péraire, kiu ekde 1928 vojaĝis bicikle tra Eŭropo, Sovetio, Japanio kaj Ĉinio. Partojn vi jam povis legi en LAŬTE. Sed la pli grandaj formato kaj amplekso de MONATO ebligas pli detalan raportadon. Ne maltrafu ĉi tiun interesan legaĵon !

Sed ĉi tio ne estas la sola argumento por la unika revuo MONATO. En ĝi aperas artikoloj, raportoj kaj informoj el ĉiuj landoj kaj ĉiuj fakoj. MONATO estas revuo, kiu ne skribas pri Esperanto, sed uzas ĉi tiun lingvon por utiligi ĝin por ĉies bezonoj kaj interesoj.

MONATO

internacia magazino sendependa
 40 paĝoj DIN A 4, riĉe ilustrita. Dek-unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 137 francaj frankoj aŭ egalvaloro. Petu provexempleron kontraŭ du internaciaj respondukuponoj ĉe la eldonejo :

TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

La red. de "Laŭte!" aparte ĝojas pro la disfamigo de la verkaro de nia amiko "ALFA-BETA" (L.A.Péraire) ankaŭ per la revuo MONATO ! Interkonsente kun la aŭtoro, "Laŭte!" tamen plu aperigos per ekstraktoj sian felietonon ĝis nun-ne-plu-malproksima "fino". Kaj espereble iam la plena verkaro trovos eldoniston ankaŭ en la nacia lingvo...

TIPAJĜOJ KAJ NOTINDAJĜOJ

PRI VOJAĜO AL BRAZILIO KAJ RIO

II. Dum la foria restado en Rio.

* Unue, kial tiu nomo ? Jen la klarigo : ĉar la eltrovintoj de tiu regiono opiniis, ke temas ne pri golfeto sed pri rivero (rivero = rio, en la portugala lingvo), kaj ĉar tiu eltrovo okazis en januaro (januaro = janeiro, en la portugala), ili nomis ĝin : Rio de Janeiro, tio estas Rivero de Januaro.

* Pro la ega malsekureco en la urbo, nia gvidisto konsilas al ni lasi monon kaj personajn dokumentojn (kiel ekzemple la pasporton) en ŝlositaj kestetoj situantaj en aparta hotel-ĉambreto. Ni kunportas nur kelkajn centojn da kruzejoj (1 franca franko egalas proksimume 16 kruzejojn).

* En Brazilio mi trovis neniun francan gazeton. En la angla mi vidis nur "Newsweek" kaj "Time". Promenante tra Copacabana, iu el la multaj kvartaloj kaj oceanbordo de Rio, mi finfine trovas la internacian ĉiusemajnan eldonon de "Le Monde" kaj, mirige, "Le Canard Enchaîné". Tio ĝojigas min, ĉar sincere mi opiniis ne povi legi tiun gazeton en Brazilo.

* Dum nia restado ni havis organizitajn vizitojn kaj liberajn duontagojn. Kun nia gvidisto, cetere angoldevena, ni vizitis la urbocentron, kiu similas al tiu de ĉiu giganta urbego, la arbaron nomitan "Tijuca", kiu estas parto mem de la urbo. Ni ankaŭ supreniris ĝis la pinto de la monto "Corcovado", la plej alta el la tuta urbo (750 m), kie staras grandega statuo de Kristo. Kaj, kompreneble ni vizitis ankaŭ la faman "paó de azucar", tio estas la "sukerkonusego", la simbolo de la ekonomia brazila ĉefurbo. El la pinto (400 m) atendas nin mirinda panoramo ĝis la blanka urbo, la verda arbaro, la bluaj oceano kaj golfeto kaj la aliaj montoj. Oni ne povas tion priskribi, sed vidi oni devas.

* Dum niaj liberaj duontagoj mi vizitis la juvelŝtontajlejon Stern ; tre interesa sed tro rapida, kaj la gvidistino ne bone parolis la francan lingvon. Mi eniris du muzeojn, la muzeon pri Belartoj kun multaj belegaj pentraĵoj kaj kelkaj statuoj kaj la muzeon pri Modernaj Artoj kie, el multaj

neinteresaĵoj (por mi), mi ĝojis vidi 3 pentraĵojn de Vasarely. Mi memoras tiujn tri, ĉar mi ege ŝatas tiujn geometriajn kaj kolorajn modernaĵojn. Ankaŭ la botanikan ĝardenon mi vizitis dum iom pli ol unu horo. Malferliĉe mi ne povis ekhavi gvidlibron kaj la afiŝetoj ne estis legeblaj pro maljuneco. Tamen, mi memoras pri 750 m longa avenuo flankigata de duobla vico de 40 m altaj palmoj.

* Iun vesperon okazas al mi aventuro : mi promenas en la larĝa avenuo, kiu iras laŭlonge de la oceanbordo kaj, subite, mi vidas blankan pastuleton sur mia maldekstra ŝuo. Tion mi apenaŭ ekvidas, jen junulo staras antaŭ mi kaj komprenigas al mi per gestoj kaj kelkaj vortoj, ke mia ŝuo ne povas tiel resti, ke ĝi bezonas purigon. Mi ne volas, sed li tiom insistas, ke finfine mi konsentas. Por tiu "laboro" li petas de mi 10 kruzejrojn, t.e. 0,60 FF komence de aŭgusto 1981. Poste mi komprenas kaj cetere oni jam avertis min pri tio, ke ili iras duope, mi supozas, ke ili dividas la sumon ricevitan. Mi precizigas la jaron kaj la monaton, ĉar en Brazilo la prezoj kreskas ĉiun jaron je 150 % kaj la valoro de la kruzejro rilate la eksterlandajn monunuojn rapide reduktiĝas.

III. Diversaĵoj kaj konkludo.

* Pri la klimato oni povas resumi la aferon tiel : unu simileco, tio estas la temperaturo (30 gradoj) en Brazilo same kiel en Rio ; unu granda diferenco, la humideco, preskaŭ nula en Brazilo (cetere, venteto sekigis miajn lipojn kaj mi ĉiam sciis) kaj kontraŭe ege grava en Rio.

* Oni devige enpoŝigas multajn monbiletojn kaj ne povas meti ilin en monujo, tiel multe ili estas. Por pagi ion oni (almenaŭ eksterlandanoj, mi mem tion spertis) devas unue dissterni ĉiujn monbiletojn sur tablo aŭ io ajn, kaj nur poste elekti tiujn, kiujn oni bezonas por fari la petitan sumon.

* Dum tiu por mi unua tago en Ameriko kaj tiu unua vizito al suda duonsfero, mia unua rimarko (jam dum la irvojaĝo) rilatas aŭroron kaj krepuskon : fakte, precipe

la unua, kiu okazis kiam ni alteriĝis en Manaus, sed ankaŭ la dua, kiu okazis kiam ni foriris el Rio al Brazilo, daŭras multe malpli longtempe ol en Francio.

* Kompreneble, mi vidis, sed ne proksime, favella-ojn, t.e. kvartaletojn konsistantajn el multaj domaĉoj el ligno kaj ferlado etaĝigitaj laŭ la deklivoj de la montetoj. Kaj tio pensigas al mi, ke en Brazilo pli ol en multaj aliaj landoj ekzistas ekstremaj situacioj : la ege riĉaj uloj kaj la treege malriĉaj uloj.

* Multaj gejunuloj, mi jam diris, intencas lerni lingvojn kaj precipe la francan. Kial ? Ekzakte mi ne scias, sed ĉu ne estas rimedo por plialtigi sian socian situacion ?

* Por fini, ni amuziĝu iomete : la unuan matenon en Brazilo, ni petas urboplanon de la hotelaj deĵorantoj. Ni rigardas ĝin kaj provas orientiĝi laŭ la suna pozicio. Sed ni ne sukcesas ; la plano ne diras la samon kiel la realeco. Do, mistero ! Nur la morgaŭon, S-ro Guillaume diras al mi kontente : mi solvis la aferon. Fakte, en suda duonsfero, kontraŭe al la norda, la suno neniam pasas je la suda ĉefpunkto. Konkludo : kutimo (aŭ alkutimiĝo) estas malbona afero. Almenaŭ pro tio, tiu vojaĝo al Sud-Ameriko ne estis senutila.

Louis ENSUQUE.

Maljunulo rakontas :

Iu maljuna amikino revenis de la Esperantokongreso en Brazilo kaj rakontis al mi inter aliaj okazaĵoj...

- Ĉu vi scias, ke en Brazilo oni ŝtelis al mi la plej gravan parton de mia mono ?...

Al tio mi demandis :

- Kie vi konservis tiun gravan monsumon ?

- Tie..., ŝi respondis al mi kaj enŝovis manon inter sia korsaĵo kaj siaj mamoj.

Mi respondis :

- Sed ĉi tie vi devis tuj senti kaj reagi !...

- Jes..., ŝi respondis al mi, forte ruĝigante... sed mi ne sciis, ke li estas ŝtelisto...

tradukis : Antoni Madej.
Pollando.

PANORAMO DE POLAJ EPIGRAMOJ

Tadeusz Gicgier

Zorgo

Zorgante pri ŝtata havaĵo
eksterordinare li estas akurata
nur duonon da aĵoj
transdonas por la cel' privata.

Sufiĉos

Se Dio permesos
sufiĉos unu kareso.

Ne okazas...

Ne okazas, ke flatulo
havas kontraŭulojn.

Ne...

Ne sukcesos la lekcio
Se mankas predilekcio.

Ankaŭ

Ankaŭ dekretoj
havas sekretojn.

Viziulo

Antaŭ ol partoprenos debaton
li pripensas postajn batojn.

Inteligenta

Nur kiam li malhisas kurtenon
Ŝi komprenis lian sintenon.

Vi estus...

Estus vi kiel pinio
sed ne kun tia talio.

Pri verkoj

de certaj verkemuloj

Fundo ilia ne estas esplorita.

Domaĝas,

Ke

pruntita.

Pri strangaj stiloj

Prognozo por multaj prozoj :
Nubo. Inklino al pozoj.

Jan Gross

Kariero de modelistino

Pro akto
Kontrakto.

Rekono

Pri li oni diros : grandulo.
Se, li fine fermos okulojn.

Wieslaw Trzaskalski

A. Fangrat

Plenumita deziro

Li petis, do ricevis manon ŝian,
La tutan ceteron ricevis alia.

Kuracilo

Pli efika ol bromo
Bona klimat' en domo.

NIA FELIETONO

TRA LA MONDO 29
per biciklo kaj esperanto

La sekvantan tagon, je la 16a, vizito al la urbo. Mi estas en la franca ambasadorejo. Oni akceptas min kun indiferento. Novan fojon mi spertas la proverbon : "Neniu estas profeto en sia urbeto !"

TOKIO, la 20an de aŭgusto 1930

Ĉirkaŭ la 16a mi alvenas en JAMADA, kie mi estas invitita en filio de KIBOSHA. Estas edukejo por junulinoj. En tiuj specialaj lernejoj ili lernas antaŭ ĉio esti bonaj patrinoj kaj edzinoj.

Post kvarhora vojaĝo en mirinda regiono, la vagonaro haltas en montara vilaĝeto NAGASIMA. Miaj gastigantoj vizitigas al mi du tre famajn sanktejojn, ĉar laŭ legendo en unu el ili estis fondita la imperia dinastio. En ĝiaj parkoj jarmilaj arboj atestas, ke tiu distrikto ne suferas tertremojn. Oni sin kredus en LOURDES pro la aspekto de tiu sankta vilaĝo, kie ŝvarmas homoj kaj butikoj vendantaj memoraĵojn.

La 7an de septembro 1930.

Je la noktiĝo mi iris promeni bordé de la apudloka golfo. Oni sin kredus sur la "Riviera". Grupoj de junuloj tie sin distras, sed serioze, senbrue. Mi pridemandas la kialon al mia gvidanto. Ĉiuj, li diras, inkluzive la junularo, laboras de 9 ĝis 12 horoj por tago. La plej benplenaj libertempas unu aŭ du tagojn en monato. Dum tiuj ripozhoroj oni apenaŭ pensas amuziĝi. La distraĵoj estas maloftaj kaj kostaj. Estas ja kino, bufedoj, distrejoj, sed la plimulto el la gejunuloj estas tro malriĉa kaj tro bridita de la ekonomiaj leĝoj por sin dediĉi al tiuj plezuroj. Tamen, la japano ĉefe ŝatas kunveni kaj sin distri familie, kaj en 1930 ekzistas tre malmultaj rondoj, kluboj, organizitaj societoj por ripoz-amuzo. Krome, en tiel mildaj klimato kaj naturo oni ne sentas bezonon kunveni kiel en la malvarmaj landoj. Ĉi tie ne estas baloj nek lokaj festoj. Publike la japano estas diskreta, kio klarigas la deteniĝemon de la junularo. La moroj estas pli individuecaj. Tio fariĝos pli kaj pli senteblo dum mia vojaĝo suden. Tamen, pro okcidenta influo, pli kaj pli multaj estas la junuloj irantaj brak-ĉe-brake kun junulino, ĉefe en grandaj urboj.

La unua problemo por pasinta, nuna kaj venonta Japanio : PLUVIVI.

Juna esperantisto min akompanis ĝis NAGOJA. En la vagonaro mi konatiĝis kun jura studento. Dank'al mia tradukanto li substrekis (kion mi jam sciis), ke la plej grava problemo por Japanio estas ties galopa demografio.

Oni havas ja la impreson, ke la instancoj energie klopodas por ĝin regi. Estas problemo pri paco aŭ milito en Oriento. La okazaĵoj de 1940 ve pravigis min. Kaj ankoraŭ hodiaŭ, en 1966, Oriento estas vulkano, kiu minacas eksplodigi la planedon. Tion oni bone enkapigu en Okcidento.

Tiu studento diris ankaŭ, ke en lia fakultato oni instruas, ke la nura PACA rimedo por Japanio estas politiko pri ekscesa eksportado, responda industriigo, persistega kaj raciiga laboro. En 1966 tio plu karakterizas la japanan politikon. La ekzemplo de la "kamikazo" dum la lasta mondmilito kaj la tiama militpolitiko de Japanio plej altgrade ilustras ĝis kia MALESPERO estis truditaj la japanoj por pluvivi. La leganto meditu pri tiuj impresoj kaj faktoj ; ili estas plu aktualaj.

Kelkajn horojn poste, Sinjoro SIRAKI, delegito de UEA en NAGOJA preskaŭ same parolis. Li kaj mi same konkludis: "Ni estas konvinkitaj, ke la homaro kuras al katastrofo". Tio okazis en 1930. Kaj en 1966, ĉar la situacio nur malboniĝis, ni kuras al tria monda kataklismo.

Mi diris al li, kaj mi ripetas : antaŭ ĉio trudiĝas en Oriento redisdono de la vivospacoj, kaj tio super ĉiu alia politika konsidero. Estas ankaŭ problemo pri nutrado, lukto kontraŭ la antaŭjuĝoj, klasaj kaj rasaj, unuvorte homkultura problemo solvenda je planeda skalo. Kaj Esperanto povas esti, jam estas, levilo de tiu hom-eman-cipo.

Ankaŭ pri tio Sinjoro SIRAKI kaj mi estas konvinkitaj. Pro tio mi firme kredas, ke miaj "junaĝaj ekstravagancoj" ne devas resti vanaj, kaj ke mia modesta atesto meritas pli ol mokojn.

Alfa-Beta

(daŭrigota)

* *

*

- ICEM-ESPERANTO estas la esperanta komisiono de INSTITUT
• COOPERATIF de l'ÉCOLE MODERNE (Instituto Kooperativa de
• Edukado Moderna) fondita de la pedagogo C. FREINET.
• FREINET-pedagogio estas tute nature internacia :
• kaj por la gelnantoj kiuj praktikas aktive korespondadon,
• kaj por la geinstruistoj kiuj regule kongresas internacie
• por interŝanĝi diversajn spertojn kaj eksperimentojn.
• Nia komisiono laboras je du direktoj:
• - interne : por favori la uzadon de Esperanto en nia medio,
• - ekstere : por konigi nian pedagogion pere de Esperanto.
• Ĉefaj agadoj :
• - senpagaj kursoj de Esperanto
• - internacia korespond-servo
• - skribitaj kaj kasedaj rondoj
• - libro-servo
• - organizado de internaciaj renkontiĝoj
• - eldonado de infan-libretoj
• - eldonado de kvar bultenoj jare...
• En tiu bulteno, 40-paĝa A4-kolora, skribas la legantoj mem,
• oni certe parolas pri pedagogio, sed ankaŭ pri nia hodiaŭa
• vivo, ĉefe laŭ la ekologiaj, pacistaj, regionaj vidpunktoj.
• Informoj kaj provekzempleroj haveblaj ĉe : ICEM-ESPERANTO,
• Saint-Puy, F 32310 VALENCE SUR BAISE.
• Abono al la bulteno : 30FF (aŭ 13 irpk) je nia poŝtkonto :
• ICEM-ESPERANTO, NANTES 224-93 Z.
• -----
• LIBRO-SERVO DE AERA : Tuj post la apero de la "katalogo" en
• "Laŭte" de oktobro, rapide elĉerpiĝis multaj titoloj el tiu
• listo. Krome, la sendkondiĉoj montriĝis ne tute adaptitaj al
• la realaj kostoj. Tial, aldone al tiu ĉi n-ro troviĝas ĝis-
• datigita listo, kiu anstataŭas tiun aperintan en oktobro.
• Atentu! La libroj sendotaj el Japanio, kies prezoj entenas
• la afrankon, restas disponeblaj : La tundro ĝemas (20FF) ;
• Lumo kaj ombro (20FF) ; Malvasta kaĝo (25FF) ; Sarkasme kaj
• entuziasme (37,50FF) ; Skiza historio de la utao (25FF) ;
• Studoj pri la E-literaturo (37,50FF). Ni pardonpetas al tiuj
• kies mendoj povis esti nur parte kontentigitaj! AERA.

"Laŭte!" rekomendas

SAT-BROŝURSERVO

Jarfine, oni kutime bilancas. Nu, koncerne la broŝurservon tiu bilanco estas alarma. Ne pro la financa aspekto - la kaso ne estas malplena - sed ja pro la malpliigo de la nombro de broŝurabonantoj. La servo ricevis multajn laŭdojn kaj aplaŭdojn, sed tio neniel ŝanĝas la situacion. Ĉar eĉ se la kaso ebligas plueldonadi, al kio tio utilos, se la broŝuroj - kvankam eldonitaj en eta kvanto - ŝimos sur bretoj en Laroque Timbaut ?

Tial, jen "speciala oferto" al la abonantaro de "Laŭte" :

- * Laŭte 1982 (ĉ. 250 paĝoj) plus
- * Jena broŝurkolekto "1982" (460 paĝoj) :
 - El Verkoj de Lanti 1 kaj 2 (vd. Laŭte n°37 p.18 kaj n°36 p.34)
 - Migrante tra Metioj (VALO) 112 paĝoj
 - Argentina Novelaro, 3a serio (6 noveloj tradukitaj de E.H.Garrote, 48 paĝoj) - recenzoj en venontaj "L!"
- * sume pli ol 700 paĝoj.... 60 francaj frankoj

Menciu sur la ĝirkupono : "Laŭte + BS 82"

La broŝurkolekto - jam preta - estos sendata al ties abonantoj kune kun la unua venontjara "Laŭte!".

Al tiuj, kiuj volas mendi apartajn broŝurojn : Validas la listo aperinta en la "Adresaro" (julio 1981), sed aldonu jenajn titolojn: (sekvas la kodo kaj la prezo en FF)
- Amo per proverboj (AP.1) - Argentina Novelaro 1 kaj 3 (AR1. 5 kaj AR3. 5) - Durruti, simbolo de la hispana revolucio (DU.2) - Esperanto in 24 pages (EA.1) - Esperanto en 24 páginas (EH.2) - Fronte al la vivo (FV.3) - Komuna Kantareto (KK.2) -

Nova prezo de "Migrante tra Metioj" : MM.10

Por ricevi estontece ĉiujn novaĵojn kun 20% rabato, eblas provizi per minimume 50 FF. Jen la sinsekvo de eldonoj ekde 1981 : VT, IS, NE, NI, GE, VL1, VL2, MM, AR3...ktp. Tiukaze, bonvolu indiki ekde kiu broŝuro vi deziras aboni.

Antaŭdankon al la legemul(in)oj ! Kribo

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire 58651
